# *La ?urnalistoj pridebatis la konceptigon de la sociekonomia modelo kuba.*




La membraro de la nacia komitato de la kuba unui?o de ?urnalistoj (UPEC), ?ia etika komisiono kaj invititoj de la amaskomunikiloj tutlande, debatis pri la strategia graveco de la komunikado kaj la amaskomunikiloj en la socio, samkiel pri la publika rajto je informado, lige al la analizo de la dokumentoj de la 7-a kongreso de la komunista partio nuntempe okazanta en la kuba socio.

La debato pri la konceptigo de la sociekonomia modelo kaj la Nacia Plano pri Socia Evoluo ?is 2030: proponoj de la nacio, aksoj kaj sektoroj strategiaj, okazis kun ?eesto de la unua vicprezidento Miguel Díaz-Canel, anka? membro de la politika buroo de la komunista partio; anka? ?eestis Alberto Alvariño Atiénzar, vicestro de departemento de la centra komitato de la partio kaj Antonio Moltó Martorell, prezidanto de la UPEC, la? raportis la gazeto Granma.

La analizon anta?is la agnosko pri la graveco kaj la koncepta valoro de amba? dokumentoj; cetere pluraj parolantoj emfazis ke la komunikado estras procezo kiu trairas la tutan socion kaj tial oni ne devas ?in vidi kiel nuran gvidilon. Endas profiti ?in kiel platformon por impulsi la civitanan partoprenon, la socian debaton kaj transformojn bezonatajn de la nacio kiun ni celas konstrui.

Pluraj parolantoj koincidis pri tio ke informado estas civitana rajto kaj pro tio ?i devas nepre esti socia propra?o; tiurilate la ?urnalistino Rosa Miriam Elizalde, membro de la estraro de la UPEC emfazis ke la amaskomunikiloj devas esti konsiderataj socia propra?o esenca, e? kiam ili povas alpreni diversajn formojn, nome, ?tatajn, kooperativajn a? aparteni al diversaj organiza?oj, sed neniam devos esti privata propra?o.

La respondeco pri plenumo de komunikado estas kolektiva, tial  devas esti inkluzivata en la korpuso de la konceptigo,  la institucioj kaj publikaj funkciuloj; siaflanke, Pelayo Terry, direktoro de la gazeto Granma aldonis ke same oni devas prikonsideri la partoprenon de la publikoj kaj celpublikoj, kaj anka? ke komunikado kaj konoj devas savgardi la kulturan sendependecon.

Oni defendis la ideon kaj proponon inkluzivi en la dokumenton Nacia Plano, la komunikadon kaj amaskomunikilojn kiel akson a? sektoron strategian pro la fakto ke nuntempe oni impulsas tra la mondo valorojn celantajn malmunti la ideosistemon defendatan de Kubo; krome oni asertis ke komunikado hodia? estas en la koro de la politiko, sed anka? kreas profitojn ekonomiajn.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/98586-la-jurnalistoj-pridebatis-la-konceptigon-de-la-sociekonomia-modelo-kuba

**Radio Habana Cuba**